

AKADEMIO DE ESPERANTO

Originala versio: La Lanterno Azia, p. 8-11. 2006-10
Prelego en la 1-a BEL-konferenco. 2008.02.04
Nuna korektita kaj ampleksigita teksto

La Universalaj Kongresoj [UK] kaj la Akademio de Esperanto [AdE] estas la du solaj institucioj, kiuj rekte devenas de publikaj proponoj de Zamenhof (1859-1917) mem en la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-Maró inter la 5-a kaj la 13-a de Aŭgusto 1905. Efektive, estis tie aprobita unue la kreo de Komitato simple Lingva, kiun prezidis Zamenhof, sed poste el propono de li mem tiu Lingva Komitato pli nombriĝis por inkluzivi konatajn redaktorojn de Esperantaj gazetoj, prezidantojn de verdaj societoj kaj gravajn esperantistojn: pli ol cent membroj en sia unua konsisto! Li rezignis la prezidantecon, kiun alprenis Emile Boirac, filozofo kaj rektoro de la Universitato de Dijono.

La krizo de Ido, kiu ekvulkanis en Februaro 1908, komprenigis al la prezidanto de la Lingva Komitato la neeblecon rapide labori kun tiom da membroj disiĝintaj tra la mondo. Sekve de tio, li proponis la kreon de supera komitato, Akademio kun ne pli ol 18 membroj, kaj baloto aprobis lian ideon.

La Lingvan Komitaton kaj ĝian Akademion prezidis inter 1905 kaj 1917 profesoro Emile Boirac (1851-1917). Sekvis tri jaroj da interrompo pro la Unua Mondmilito. Inter 1920 kaj 1931 prezidis profesoro Théophile Cart (1855-1931), inter 1931 kaj 1933 aktuario John Mabon Warden (1856-1933), inter 1933 kaj 1937 inĝeniero Maujrice /rollet de Lisle (1859-1943), inter 1937 kaj 1963 inĝeniero Johannes R. C. Isbrücker (1889-1967), kiu dissendis en Julio 1939 la 19-an Cirkuleron sen ia respondo. La tri unuajn prezidantojn eksigis la morto: pli bone mi ne kandidatiĝu por esti la kvara!

Tiu nia unua periodo respondis laŭ mi pri tri ĉefaj laboroj:

1. Ses Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro aperintaj inter 1909 kaj 1935.
2. Korektoj de eraraj tradukoj en la Universala Vortaro de la Fundamento de Esperanto inter 1906 kaj 1923.
3. Rifuzo oficialigi la internacian *-io* por landnomoj en 1922.

La agado de la Akademio restis interrompita per la Dua Mondmilito dum pli ol ses jaroj.

La dua periodo komenciĝas en Marto 1946 per la postmilita 20-a Cirkulero, subskribita de Isbrücker, kun respondoj de 48 el la 102 membroj de la Lingva Komitato. La precipa ago de tiu nova periodo estis la profunda reformo de la Institucio per la malaperigo de la Lingva Komitato kaj la restigo de la sola Akademio: la proponoj, inter ili la nova Statuto, estis aprobitaj en 1948.07.20.

Du aparte gravaj decidoj en lia mandato:

1. Oficialigo de la neinternacia *-enda* en Julio 1953, unu el la maloftaj malvenkoj de Gaston Waringhien, kiu voĉdonis kontraŭ ĝia aprobo.
2. La Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro, preparita de Gaston Waringhien en Junio 1955 kaj aprobe voĉdonita en Julio 1958.

En 1963 Gaston Waringhien fariĝis prezidanto, kaj tiun postenon li forlasis nur en 1979. La plej konata strebado de lia prezidanteco estis la reformo de la Statuto de 1948, aprobita en Julio 1964, kiu validis ĝis la nova reformo en la mandato de André Albault.

Kun la Statuto farita kaj aprobita, li lancis sin al malfacila batalo, kiu dividis nian rondon en du grupoj de atistoj kaj itistoj: la senco kaj la uzo de niaj participoj. Maldolĉan malvenkon li suferis en Novembro 1966, kiam lia propono estis malaprobita per unu sola mankanta voĉo. La sekvantan jaron li havis facilan venkon en Novembro 1967, kvankam per diskutata driblo kaj manovro: aprobo de kvar frazoj, en kiuj aperis la kontestataj participoj. Bedaŭrinde, lia venko restis sole sur la papero, ĉar ĝis nun multas kaj tumultas la eraroj kontraŭ la vera senco de tiuj delikataj vortoj: el abundo venas vundo...

Estis aliaj gravaj taskoj portitaj de li al plena sukceso:

1. Oka oficiala aldono al la Universala Vortaro.
2. Baza Radikaro Oficiala.
3. Rekomendoj de la Akademio: Pri la refleksivo kaj Pri la vorto "po".

Post la kvin mandatoj de Gaston Waringhien (1901-1991) sekvis William Auld (1923-2006.09.11), kiu prezidis la Akademion inter 1979 kaj 1983. Al li ni ŝuldas gravan defendon de niaj supersignitaj literoj. Lin la verda Deino tenu en sia sino!

André Albault (1930) komencis sian tempon en 1983 kaj ĝin okupis precipe per intensa laborado super landnomoj, kiuj ĝis nun levas disputojn. Pro la manko de jura personeco, per kiu li provis sen sukceso doti la Akademion, li starigis leĝan internacian asocion nomatan La Amikoj de Esperanto (1987.05.24}, kiu helpis nian plej antikvan Institucion kaj eldonis samnoman bultenon por disvastigo de la akademiaj laboroj per siaj tridek numeroj inter 1987 kaj 1995. Multo de la elspezoj de nia Akademio estis tiam kovrataj de tiuj amikoj. Grava estis lia redaktigo de la tria reformo de la Statuto de la Akademio de Esperanto en 1988, ĝis nun valida.

En 1998 ekprezidis la Akademion Geraldo Mattos (1931), la unua neeŭropano en tia posteno. En lia mandato estis kreita la [Konsultejo de la Akademio de Esperanto](#), tiam komisiono kaj nun sekcio, kaj estis voĉdonita la 9-a Oficiala aldono al la Universala Vortaro, laboro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro sub la direktoreco de Bertilo Wennergren, krom decido de la Sekcio pri Prononco sub la direktoreco de Probal Dasgupta por klarigo pri niaj supersignoj sur la ekrano de komputilo. Persone Geraldo Mattos batalas kontraŭ la oftaj misuzoj de la participoj, kiujn klarigas tri facilaj sencoreguloj, ĉar participoj ne estas io gramatika, sed semantika, kaj do generas nur paradoksajn sencoerarojn:

-anta / -ata:	dum fakto trudata de verba radikalo	- leganta / legata:	dum lego
-inta / -ita:	post fakto trudata de verba radikalo	- leginta / legita:	post lego
-onta / -ota:	antaŭ fakto trudata de verba radikalo	- legonta / legota:	antaŭ lego

Ĉiu tamen bonvolu pensi, kio okazas post la fakto trudata de la verba radikalo: dorminta homo estas homo post la dormo, sekve vekita aŭ vekiginta...

Ni vidu nun, kion diras al ni la nuna Statuto pri kelkaj el siaj esencaj punktoj!

La celon informas la 1-a artikolo de la Statuto: konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.

Pri la membroj komentas la 3-a, 4-a kaj 5-a artikoloj: ili konfirmas respektive la limon de 45 membroj, la 9-jaran mandaton kaj la elekton de unu triono ĉiun trian jaron. Sekve de tio, ĉiu akademiano estas senmorta por naŭ jaroj!...

En la 15-a, 16-a kaj en la 17-a artikoloj aperas la organizo de la Akademio, kiun kondukas la membroj de la Estraro kaj la direktoroj de Sekcioj kaj Komisionoj.

Ĝin orientas la Estraro kaj la estraranoj. Prezidanto: John Wells. Vicprezidantoj: Probal Dasgupta kaj Brian Moon. Sekretario: Renato Corsetti.

Ĝin laborigas la direktoroj de Sekcioj por lingvaj taskoj, kaj tiuj de Komisionoj por alispecaj. Faka Lingvo: Marc Bavant. Ĝenerala Vortaro: Bertilo Wennergren. Gramatiko: Jouko Lindstedt. Kontrolado de lerniloj: Marc Bavant. Lingva Konsultejo: Boris Kolker. Literaturo: Humphrey Tonkin. Prononco: Probal Dasgupta. Historio de la Akademio de Esperanto [komisiono]: Carlo Minnaja.

Precipe grava estas ĝia Lingva Konsultejo. kiu povas prezenti al nia publiko – unuopuloj, grupoj kaj institucioj! – rapidajn solvojn por ĉiaj lingvaj problemoj sub sia respondeco. La respondeco de la Akademio postulas pli da tempo!

La agado estas klarigata en la 20-a kaj 22-a artikoloj de la Statuto: La Akademio esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton, kaj ilin poste decidas rekomendi aŭ aprobi, malrekomendi aŭ malaprobi.

En unu sola momento de ĉiu jaro la Akademio de Esperanto sin prezentas ĉeesta al sia publiko: dum la Universalaj Kongresoj.

Kaj nun en la fino de mia referato, mi petas de mia afabla geleganto permeson por meti mian nazon en fremdan vazon, ĉar mi ne estas historiisto. Ĉiuj parolas pri du periodoj en la historio de la Akademio, sed pli bone estus akcepti tri periodojn: la unua ĝis la fino de la Unua Mondmilito kaj ĝiaj kostoj al Esperanto (1905-1920), karakterizata per la prudenta influo de Zamenhof, la dua de tiam ĝis la fino de la Dua Mondmilito kaj ĝiaj kostoj al Esperanto (1920-1946), konata per la forta influo de Cart, kaj la tria de tiam ĝis nun, markata per la vigla influo de Waringhien.

Dojeno estas Marjorie Bulton, akademianino de 1967, sed estas du el la sekvanta triono de 1970: John Wells kaj Geraldo Mattos.

Gravetaj, gravaj kaj gravegaj eraroj de la akademianoj:

1. La Lingva Komitato en la 3OA difinas en 1921 la vorton *nekrologo* kiel artikolon pri vivo kaj agoj de mortinto, pro la germana kaj pola. Charles Verax [Enciklopedia Vortareto Esperanta, p. 166. Paris: Hachette, 1910. 249 p.] oponas: **Nekrologo**, *nécrologue*, verkanto de nekrologioj. Kaj tio okazas sub Cart, kiu antaŭparolis al la Vortaro Franca-Esperanto [Paris: Presa Esperantista Societo, 1908. 665 p.], kies verkintoj pree oponas al lia estonta decido en la p. 454: NÉCROLOGIE, *nekrologio*, *Nécrologue*, *nekrologo*. Tian decidon kontraŭas pli ol kvindeko da grekdevenaj istovortoj, al kiuj ĉiam respondas po unu studovorto, kaj mi ekzemplas per la vortoj *antropologo* [sciencisto] kaj *antropologio* [scienco]. La listo estas pli longa ol la nun prezentata:

Antropologo, arkeologo, astrologo, biologo, citologo, dermatologo, egiptologo, entomologo, esperantologo, etologo, etimologo, etiologo, etnologo, filologo, fiziologo, fotologo, frenologo, genealogo, ginekologo, geologo, grafologo, grundologo, hagiologo, hematologo, hidrologo, iktiologo, kardiologo, kosmologo, laringologo, meteorologo, mineralogo [kun haplogio], mitologo, *nekrologo*, nematodologo, ornitologo, otologo, paleologo, paleontologo, patologo, pedologo, plantologo, pneŭmonologo, psikologo, seismologo, semiologo, sociologo, stomatologo, teatrologo, teologo, urologo, vinologo, zoologo.

2. La granda prestiĝo de la Akademio de Esperanto en la sesdekaj jaroj influis la akcepton de la falsaj ekvacioj proponitaj de prezidanto J. R. G. Isbrücker en cirkulero disdonita dum la publika kunsido okaze de la 45-a UK de Bruselo en 1960:

-anta = kiu -as	-ata = kiun (kion) oni -as
-inta = kiu -is	-ita = kiun (kion) oni -is
-onta = kiu -os	-ota = kiun (kion) oni -os

Ekzemploj pruvas, ke ili estas plene eraraj:

Mi rigardas al homo kantanta.	= Mi rigardas al homo, kiu kantas.
Mi rigardis al homo kantanta.	= Mi rigardis al homo, kiu kantis.
Mi rigardos al homo kantanta.	= Mi rigardos al homo, kiu kantos.
Min ravas la himno kantata de li.	= Min ravas la himno, kiun li kantas.
Min ravis la himno kantata de li.	= Min ravis la himno, kiun li kantis.
Min ravis la himno kantata de li.	= Min ravis la himno, kiun li kantos.
Enirinte, li sidiĝas.	= Post kiam li eniras, li sidiĝas.
Enirinte, li sidiĝis.	= Post kiam li eniris, li sidiĝis.
Enirinte, li sidiĝos.	= Post kiam li eniros, li sidiĝos.

Teksto de novembro 2006: Pri la estantaj kaj estintaj pasivaj participoj, mi nun ekzemplas per mia nuna malsano: post nelonge mi estos paciento de kirurgo.... Pri mi mem mi povas nun diri:

- Nun mi devas esti operaciata. Kiam mi estos operaciata, kirurgo, anesteziisto kaj flegistinoj ĉirkaŭos min. Kiam mi estos operaciata, mi reiros hejmen.

Averto de novembro 2007: Dank' al mia Deino la operacio ne estis bezonata.

3. Inter 1965.02.03 kaj 1967.11.23 la participoj dividis la akademianojn en du grupoj sub Gaston Waringhien (1963-1979), kaj nur manovro ebligis fini tiun diskuton: analizi la sencojn de kvar frazoj senditaj de kvar Esperantaj organizaĵoj. Li venkis, eĉ kun la voĉo de Carlos Domingues, unu el la prezidantoj de BEL, sed tia triumfo donis neniajn regulojn por la uzado de niaj participoj, precipe se ni konsideras, ke unu el la kvar frazoj prezentas particon, kiu havas nur pure adjektivan funkcion, sekve sen ia referenco al aktiva verboformo kaj sen ebleco de kohera respondo [la 2-a frazo], kaj alia estas ambigua ekster kunteksto [la 4-a frazo], kvankam la plej ofta estas la unua, kiu ne tre ĝentile ĉiam indikis itistan opinion. Nur unu el la akademianoj vidis en la participoj la samajn regulojn kiel mi mem: A. Rudolf Haferkorn (1896-1988), kies voĉdonon mi ripetis, la sola Koperniko inter multaj Ptolemeoj...

La frazoj estis faritaj de Union Française pour l'Espéranto, submetitaj al la decido de EsperantoVereinigung Deutscher Lehrer kaj senditaj al la Akademio de Esperanto por fina solvo. Krome, Deutscher Esperanto-Bund kaj Universala Esperanto-Asocio petis, ke la Akademio de Esperanto esploru kaj solvu la problemon de la pasivaj participoj. Tiuj frazoj devigas la leganton al la deduko de reguloj, kiuj estas tre malfacilaj pro la negranda teksto sen lingvaj cirkonstancoj, cetere kun participaj mistrafoj.

TESTOFRAZOJ

1 - *“Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970.”*

= Do la garantiantoj estos kvitaj,

A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon de la domoj detruitaj....

B) Nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.

2 - *“Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo.”*

= A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;

B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

3 - *“Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X estis efektive riparata la lastan semajnon.”*

= A) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭtomobilo;

B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon de la aŭtomobilo.

4 - *“Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio.”*

= A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;

B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

4. La konstanta penado de prezidanto Albault estis fruktodona laboro, sed permesis kelkajn facilanimajn decidojn kaj asertojn [miaj rektaj krampoj]:

- nuligo de la antaŭa decido de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kontraŭ la latina sufikso *-io*. Aktoj II, p. 12 kaj 19.

- tolero de *un*': nenio en la Statuto parolas pri tolero... Aktoj II p. 31

- oficialigo de la numeralo *nul*. Aktoj II p. 34.

- Unu arbitra [-ujo], la alia internacia [-io]: simple oportunigita formo de la slava finaĵo *-ija*. Aktoj III

- konfuzo inter la greka kaj la latina finaĵoj *-io*: zoologio / Bolivio. Aktoj III

- Permeso uzi la internacian latinan landsufikson anstataŭ la Fundamenta:

Tiel same ni proponas, ke la normoj enprenu en egaleco la sufiksojn *-ujo* kaj *-io* [...] nur en la okazoj, en kiuj oni povas libere interŝanĝi ilin (Ekz-e, Anglujo / Anglio, sed nur Bolivio) . Aktoj III.

Geraldo Mattos

Fono 55 41 3238 4056

Fonofakso 55 41 3367 9706

geraldomattos@netpar.com.br

www.gmverda.com.br